Hermann Löns,

# Lüneburga erikejo

*tradukita de Oskar Breddermann*

1. Lüneburgan erikejon
en mirige bela land'
mi trapasis ĉiuloken,
multon montris voja rand'
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

3. Fratoj, lasu glasojn tinti;
ĉar la muskatela vin'
acidiĝus pro maluzo,
tial ne eltrinku ĝin.
Faleri, falera
ho: karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

3. Ruĝajn cervojn ni ekĉasu
gaje en arbaro, dum
niaj hundoj laŭte bojas
kaj pafiloj krakas "bum".
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

...

Hermann Löns,

# Auf der Lüneburger Heide

1. Auf der Lüneburger Heide
In dem wunderschönen Land
Ging ich auf und ging ich unter
Allerlei am Weg ich fand
Valleri, vallera,
und jucheirassa, und jucheirassa,
bester Schatz, bester Schatz,
denn du weißt es weißt es ja.

2. Brüder lasst die Gläser klingen
Denn der Muskatellerwein
Wird vom langen Stehen sauer
Ausgetrunken muss er sein
Valleri, vallera,
und jucheirassa, und jucheirassa,
bester Schatz, bester Schatz,
denn du weißt es weißt es ja.

3. Und die Bracken und die bellen
Und die Büchse und die knallt
Rote Hirsche woll'n wir jagen
In dem grünen, grünen Wald
Valleri, vallera,
und jucheirassa, und jucheirassa,
bester Schatz, bester Schatz,
denn du weißt es weißt es ja.

...

Hermann Löns,

# Sur la Lujneburga erikejo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. Lujneburga erikejo,
Vi mirakle bela land'.
Tramigrante vin mi trovis
Multon ĉe la vojo-rand'.
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion:ja.

2. Fratoj, ni tintigu niajn
Glasojn, ĉar la juna vin'
Netrinkite acidiĝos.
Do, ni nun eltrinku ĝin
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion ja.

3. Kaj la hundoj, ili bojas,
La pafilo, knalas ĝi,
Ruĝojn cervojn volas ĉasi
En arbaro verda ni.
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion ja.

...

4. Vi belega, vi ĉarmega
kvazaŭ lakt' kaj sango, flor';
ni anime kunligiĝu
kaj nin amu kor' al kor'.
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

*Traduko de la Germana poemo "Auf der Lüneburger Heide" de* Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de Oskar Breddermann.*

*Arg-624-1262 (2012-10-23 21:11:11)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kantlibreto "Jen la kanto de l' vojaĝ"', eldonita de Dansk Esperanto-Forlag en la jaro 1973, represita de D.E.F. (Dana Esperanto-Federacio).*

4. Ei du Hübsche, ei du Feine
Ei du Bild wie Milch und Blut
Unsere Herzen woll'n wir tauschen
Denn du glaubst nicht wie das tut
Valleri, vallera,
und jucheirassa, und jucheirassa,
bester Schatz, bester Schatz,
denn du weißt es weißt es ja.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26).*

*Arg-624-1260 (2012-10-23 21:15:43)*

*Vidu:* `http://de.wikipedia.org/wiki/Auf_der_L%C3%BCneburger_Heide`*. La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Ludwig Rahlfs. Vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Rahlfs`*. La melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/AufderLu.html`*. Pri la aŭtoro vidu la retejojn* `http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns` *kaj* `http://www.loens-verband.de/`*.*

4. Ho, vi rava belulino,
Bildo lakta-sanga vi,
Niajn korojn interŝanĝu
Ni, ĉar bonas tio ĉi.
Faleri, falera
Kaj juĥajrasa, kaj juĥajrasa,
Amatin', amatin';
Ĉar vi scias tion ja.

*Traduko de la Germana poemo "Auf der Lüneburger Heide" de* Hermann Löns *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-624-1261 (2012-10-22 23:12:20)*

*Pri la aŭtoro vidu la retejojn* `http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_L%C3%B6ns` *kaj* `http://www.loens-verband.de/`*.*